# NOVAĴLETERO

Nr. 22
Sept.-Okt. 1985

Monata informilo de la Bruĝa Grupo Esperantista
Maandelijks informatieblad van de Brugse Esperanto-Groep

Ver. Uitg.: R. Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge

Lidgeld: 200 fr. per jaar op postrekening 000-0483533-85
van Bruĝa Grupo Esperantista, 8000 Brugge.
Steunende leden: 500 fr.

## Vergadering van 14 september 1985

Het voorstel in verband met het resultaat van het Markola Kongreso (uiteindelijk 11.000 fr.), werd goedgekeurd.

In afwachting van de algemene ledenvergadering van begin 1986 wordt het voorzitterschap waargenomen door Karlo Poupeye, Schepenbankstraat 30, 8310 Brugge 3.

Volgende vergadering op zaterdag 19 oktober a.s. bij Mevr. Debaets-Huyghe, Potterierei 1, 8000 Brugge, om 14.30 u.

## Nekrologo

En julio mortis membro de nia grupo Michel Nolf el Sint-Andries.

## Damme

De la 15a ĝis la 18a de aŭgusto grupo de 87 personoj el la germana urbo Damme vizitis la samnoman belgan urbon. Inter ili estis ankaŭ Thomas Pusch, LKK-ano de la ĉijara IJK.

Dimanĉon la 18an li kune kun 3 lokaj Esperantistoj (Annie Marmenout, Jean-Pierre VandenDaele kaj André Ruysschaert) spektis la Paradprocesion de la Ora Arbo en Brugge.

## Snelcursus Esperanto te Leuven

### Wat ?

Een volledig overzicht van de Esperanto-spraakkunst en een duidelijk inzicht in de mogelijkheden van de taal, met een resultaat dat rustig kan vergeleken worden met de kennis die men van een andere taal (vb. het Engels) verwerft tijdens één jaar avond-cursus.

### Plaats

Cultureel Centrum, Craenendonck (naast nr. 21), Leuven.

### Tijdstip

Zaterdag 19 en zondag 20 oktober 1985, telkens van 9 tot 12 en van 13 tot 17 uur.

### Inschrijving

Voorinschrijving is verplicht. Dit kan door storting van 500 fr. op rekening 734-3331944-03 van Esperanto 2000, Leuven; of met een cheque aan: Esperanto 2000, Duisburgsestraat 12, 3030 Leuven-Heverlee. Dit bedrag omvat inschrijving en cursus-materiaal. Bijkomende informatie: 016/20.14.53.



## Universala Kongreso en Augsburg.

Ni decidis partopreni la antaŭ-kongresa, semajnon en Oberkirch, al kio nur ĉeestis la limigita nombro de 37, el 12 landoj.
La plej taŭga vojo por ni estis al Strasbourg kie ni devis ŝanĝi por Oberkirch. Je la alveno ni rekte iris al la ejo de rendevuo, kie la loka grupo bonvenigis nin, kaj kondukis nin al nia hotelo, ĉe "tante Hedwig". Estis tre malnova domo kun tre afabla estrino. Vespere okazis la interkona vespero, interesa kaj amuza.
Ĉiu tage okazis ekskurso , ĉu al kastelo, ĉu al alia loko .
Inter alie ni veturis aŭtoĉare al Baden-Baden por viziti la kazinon kaj ludsalonojn, ŝajne la plej belaj de la mondo.
Ĉiu vespere ni pasigis kune en salono de iu aŭ alia hotelo, kaj ni certe travivis tre agrablajn tagojn.
Amuza anekdoto : Dum promenado subite saltis el unu domo juna kamenpurigisto en la specifika nigra uniformo kaj la alta cilindra ĉapelo. Ni interparolis kaj li permesis fotografi lin.

La grupestraro de Oberkirch organizis komunan aŭtobusveturadon al Augsburg por la Universala Kongreso.
La Kongreso estis bone organizita. La solena inaŭguro okazis en la granda sporthalo de Augsburg, kiu estis tute plenigita.
Ĉiu tage aperis kongresa kuriero "La Strobilo" (tiel nomita laŭ la urba blazono). Ankaŭ la eskursoj estis taŭge antaŭpreparitaj. Ni elektis por la tuttaga ekskurso al "Bodensee" kun belega insulo "Mainau". Tiu insulo havas areon de 45 hektaroj, kaj estas nomita la insulo de la floroj: belegaj parkoj kaj floroj, ĉar tie estas tropika klimato. La insulo apartenas al Grafo Bernadotte el Svedujo. La vizito de tiu-ĉi donis al ni neforgeseblan memoron.
La posttagmeza ekskurso kondukis nin al Munkeno kaj bedaŭrinde pluvegis la tutan tagon. Sed tio ne gravis por ni; anstataŭ eliri la aŭtobuson ni veturis al la belega kastelo "Nymphenburg" kiu estis la iama somera restadejo de la Bavaria estrego, kaj tre vizitinda.

Alian tagon ni ekskursis al Pfaffenhofen, centro de lupol-kulturo kaj bierfarejoj. Do, ni vizitis unue bienon kaj la estro kondukis nin al la kampo kie li klarigis la kulturon. Poste ni vizitis bierfarejon kaj gustumis la bonan bieron. En tiu urbo la loka grupo organizis feston kun bavara manĝ-aĵo .

La tempo forflugis tre rapide kaj la tagoj estis plenplenaj de diversaj okazintaĵoj. Tiam rapide alvenis la sabato kaj la fermo de la kongreso.
La ĉina delegito transprenis la kongresan flagon el la manoj de la L.K.K.-prezidanto, kaj la kantado de "La Espero" finis la 70-an Universalan Kongreson.

M. De Baets
M. Willems

Denove okazis renkontiĝo en Aylesford de la 27an ĝis la 29an de septembro. Tiun-ĉi fojon ĉeestis 37 gesamideanoj el 3 landoj. Sabaton matene okazis lecionoj por komencantaj kaj progresantoj. La aliaj rakontis pri siaj vojaĝoj al Internaciaj Kongresoj. Posttagmeze okazis ekskursoj laŭ elekto.

M. De Baets
M. Willems

## Avondcursus Esperanto te Brugge

Op 10 oktober a.s. start een avondcursus te Brugge (Hof van Watervliet, 19.30 u.)

Inlichtingen te verkrijgen op telefoonnummer 33.19.81.

(Br. H.)